Universala Esperanto-Asocio

EKO UKO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2016-21 sendita el Nitra (Slovakio), la 27an de julio.  EKO-UKO numero 1*


*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

Glata organizado, tre konvena kongresejo, bonega tuturba vidigo de Esperanto kaj rekorde ampleksa parto de la kongresa programo malferma al la urba ;publiko. Jen impresoj pri la 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra, Slovakio. La kongreso jam troviĝas mezvoje tra ĝia semajno. La inaŭgura prelego de la prezidanto de UEA aperis en la tria numero de la Kongresa Kuriero, kiu estos certe trovebla en la reto.

## *Komuna Malfermo de la Jaro de la Lernanto*

Tiu jaro okazos de julio 2016 ĝis julio 2017 kun komuna prizorgo de UEA kaj ILEI. La malfermo de la Jaro okazis en mardo, la 26an de julio, la Esperanto-Tago, kadre de la Tago de la Lernanto en la UK en Nitro. La Malfermon prizorgis la prezidantoj de UEA kaj ILEI, Mark Fettes kaj Mirejo Grosjean. Ili ambaŭ parolis pri la ideaj kaj principaj celoj pri la jaro, dum la vicprezidatno de UEA, Stefan MacGill, prezentis projekcie kvin proponojn por la celoj de la jaro, sepon da strategioj por realigi tiujn celojn, kaj dekon da sugestoj por lokaj kluboj, landaj kaj fakaj asocioj kaj E-centroj, kiel ili povos utile kontribui al la markado de la jaro. Fine de la prezento estis prezentita deko da eventoj, kie okazos aŭ povos okazi markadon de la Jaro. Tiuj ampleksas ĉiujn kvin kontinentojn. La tuto estos prezentita en la juli-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto*. Pri la cetero de la Tago de lernado raportos ILEI.

*Foto: Marija Belošević.*



Ni pardonpetas pro la manko de komunikoj EKO-UKO ĝis nun, pro teknikaj kialoj. Sed disiris tri Gazetaraj Komunikoj pri Kongresaj temoj tra lastaj tagoj.